

BELGA ESPERANTISTO



MONATA REVUO



Oficiala organo de la Belga Ligo Esperantista

redaktata de VAN DER BIEST-ANDELHOF, direktoro ;

LÉON CHAMPY, FRANS SCHOofs, kaj

OSCAR VAN SCHOOR.

ABONPREZO :

Belglando . . . Fr. 4.— (Sm. 1.60)
 Eksterlando . . Fr. 5.— (Sm. 2.—)
 Unu numero . . Fr. 0.40 (Sm. 0.16)

Sekretariejo : 49, Kleine Beerstraat,
 (rue de la Petite Ourse), Antwerpen,
 Anvers.

Abonoj kaj Monsendoj : 20, Vondel-
 straat (rue Vondel), id.

Jurnaloj, broŝuroj, libroj : 26, Arend-
 straat (rue de l'Aigle), id.

*Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas. — La Redakcio konservas por
 si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.*

BELGA LIGO ESPERANTISTA

KONGRESO DE 1910

ANTVERPENo, la 1^{an} de Majo 1910.

Estimata Samidean(in)o,

Laŭ decido alprenita en Verviers la 27an de Junio 1909, la **2a belga esperantista kongreso** okazos nunjare en Bruĝo, la 15-16an de Majo (Pentekostofestotagoj).

Ni havas la honoron inviti vin por partopreni en tiu kongreso, kiu konsistos el la regula ĉiujara kunsido de la Belga Ligo Esperantista kaj el allogaj festoj, organizotaj de la Bruĝa grupo.

La Bruĝa urbeŝtraro akceptos oficiale la gekongresanojn en la Urbdomo, kaj la kunsido okazos en la festsalonego de la Provinca Estrarejo, ŝuldata al la bonvolemo de de Lia Moŝto, Barono Ruzette-van Caloen de Basseghem, provincestro de Okcidenta-Flandro.

Ni esperas, Estimata Samidean(in)o, ke vi bonvolos respondi al nia alvoko, kaj sciigi plej baldaŭ pri via aliĝo S-ron A. J. Witteryck, prezidanto de la Bruĝa Grupo Esperantista, aldonante 50 centimojn por la kongresa karto.

Diversaj fremdlandaj esperantistoj ĉeestos la kongreson, kiu do estos reala festo de internacia frateco.

Ni prezentas al vi, Estimata Samidean(in)o, nian plej afablan saluton.

La ĝenerala Sekretario,
 LÉON CHAMPY.

La Prezidanto,
 VAN DER BIEST-ANDELHOF.

PROGRAMO

DE LA

II^o Belga Esperantista Kongreso

(Bruĝo, la 15-16an de Majo 1910).

UNUA TAGO, DIMANĈO.

9 1/2 h. — Kunveno de la gekongresanoj en la « Hôtel du Cornet d'Or », Placo Simon Stevin.

10 h. — Oficiala akcepto en la Urbdomo.

11 h. — Jara ĝenerala kunveno de la Belga Ligo Esperantista en la festsalonego de la Provincestra Hotelo, Granda Placo.

13 h. — Promenado en la halo de la Belfrido.

15 h. — Promenadeto al la Lago de Amo, la Beginejo, tra la urbo.

19 1/2 h. — Intima festo en la festĉambrego de la « Aigle Impériale », Placo de l' Teatro.

DUA TAGO, LUNDO.

9 h. — Kunveno de la gekongresanoj en la « Hôtel de l'Aigle d'Or, Placo de la Monfabrikejo (Muntplaats, Place de la Monnaie).

9 1/2 h. — Vizitado al la muzeoj de la urbo.

11 h. — Ekskurso per vaporŝipo al Bruĝo-haveno (Zeebrugge). Promenado sur la havezmuŝuro.

13 h. — Tagmeza manĝo (lunch) en la Granda Hotelo de Zeebrugge.

15 h. — Promenado laŭlonge de la marbordo al Blankenbergo.

Vespere. — Reveturo al Bruĝo vagonare.

La kosto de la kongresa karto estas 50 centimoj — Sm. 0. 2 ; tiu karto rajtigas partopreni en la intima festo, vizito al la muzeoj, ekskurso.

La festmanĝo, sen trinkajo, kostos 3 frankojn — Sm. 1.2. La organiza komitato petas la prezidantojn de la grupoj kolekti la enskribprezon de ĉiuj partoprenontoj kaj sendi la opan sumon al S-ro A. J. WITTERYCK, 4, Nieuwe Wandeling (Nouvelle Promenade), Brugge (Bruges), plej malfrue la 9an de Majo.

La personoj, kiuj volas nokte loĝi en Bruĝo estas petataj informi pri tio S-ron Witteryck, kaj sciigi al li kiom ili volas elspezi. La diversaj prezoj estas fr. 5.25, — fr. 4.50, — fr. 4.25, — fr. 3.00, — fr. 2.75, — fr. 2.60, — fr. 2.50 kaj fr. 2.25, por unu nokto kaj matenmanĝo.

La toastoj estos reguligataj de la organiza komitato.

BELGA LIGO ESPERANTISTA

TAGORDO

de la ĝenerala kunveno, okazonta en Bruĝo, Dimanĉon, la 15an de Majo 1910, je la 11a matene, tre akurate, en la Provincestra Hotelo, Granda Placo.

1. — Parolado de la Prezidanto.
2. — Raporto de la ĝenerala sekretario pri la agadoj de la Ligo dum 1909-1910
3. — Raporto de la kasisto. Bilanco.
4. — Disdono de la diplomoj pri profesora kapableco.

5. — Esperantistoj, vi kantu ! Parolado de S-ro SWAGERS (Antverpeno).

6. — Esperanto inter la junularo. Parolado de S-ro LOUIS VAN AUBEL (Lieĝo).

7. — Propono de S-ro DELVAUX por okazigi la venontan kongreson en Charleroi. Eventuelaj aliaj komunikajoj.

8. — Elektro de ses membroj de la komitato, laŭ la artikolo 7a de la regularo. La elirantaj komitatanoj estas S-roj L. CHAMPY (Antverpeno), KOMANDANTO DUVERDYN (Bruĝo), PASTRO RICHARDSON (Bruselo), Fr. SWAGERS, D-ro R. VAN MELCKEBEKE kaj O. VAN SCHOOR (Antverpeno).

Ĉiuj estas reelekteblaj.

AL BRUĜO !

Nur kelkaj tagoj nin disigas ankoraŭ de la Bruĝa kongreso.

Konsili al tiuj el niaj ĝesamideanoj kiuj jam ĉeestis la unuan kongreson ke ili ankaŭ partoprenu en la nunjara, estus tute senutile : ili certe ankoraŭ memoras la ĝojan interkonatiĝon kun niaj Verviersaj amikoj, — la solenan akcepton en la Urbeŝtrara Hotelo, — la interesplenan ĝeneralan kunsidon kun ĝia fiera deklaro de fideleco, — la belajn festojn, organizitajn de niaj tiaj samcelanoj....

Al tiuj « malnovuloj » ni nur diros, ke la Bruĝa kongreso estos nek malpli grava, nek malpli brila, ol la Verviersa.

Nia alvoko sin direktas speciale al tiuj el niaj amikoj, kiuj ĝis nun nur siajn grupajn kunvenojn ĉeestis, kiuj ne ankoraŭ kun aliurbaj, alilandaj samideanoj konatiĝis.

Al ili ni diras :

Iru al Bruĝo, por vivice vivadi dum du tagoj en Esperantujo, por aŭdi ĉirkaŭ vi nur la karan Zamenhofan lingvon, por spiradi tiun esperantistan aeron, kiu revivigas, kiu donos kuraĝon al la malfortuloj, kiu forigas skeptikecon, kiu altigas la korojn kaj la spiritojn, kiu incitas al boneco, al frateco, al pacemeco !

Ĝeamikoj, ĉiuj al Bruĝo !

B. E.

ESPERANTISTA GRUPO « LA VERDA STELO »

ANTVERPENO

La membroj estas insiste petataj ĉeesti la eksterordan kunvenon, okazontan MERKREDON, LA 11an DE MAJO, je la 8 1/2 vespere, en la kafejo « Zomerhof » 32, Dageraadplaats (place de l'Aurore).

TAGORDO. 1. Raporto pri la lasta kunveno. — 2. Elektro de 3 komisarioj. — 3. *Belga Esperantista Kongreso*, Bruĝo 15-16 Majo. — 4. Propagandaj rimedoj. — 5. Propagando inter diamantlaboristoj. — 6. Kursoj. — 7. Universala Esperantista Asocio. — 8. Diversaj informoj.

La jena informo anstataŭas la kunvokilojn.

La Prezidanto,
FRANS SCHOOFs.

NI RESTU FIDELAJ!

Laŭ la melodio de PETERS :
Strömt herbei, ihr Völkerscharen.

Esperanta teksto
de H. ARNZT.

1. Al ba - tal - o por la cel - o, Ki - u
lum - as ant - aŭ ni, De l' stan - dard - o verd - a
stel - o Brill - as. Ko - lekt - ig - u vi! Al pos -
ten - o, ba - tal - ant - o, Vi - an dev - on - fara - u
vi! Fort - e star - os Es - per - ant - o, Se fi -
del - aj rest - os ni, Fort - e star - os Es - per -
ant - o, Se fi - del - aj rest - os ni!

2. Al batalo, nia rondo,
Venku ni, en nia sfer',
Jam progresas en la mondo
Ĉiutage pli l'afel',
Se ĝin vidus la dubanto
Nepre konvinkigus li.
Certe venkos Esperanto,
Se fidelaj restos ni.

3. En batalo malamika
Estas antaŭopin',
Ĝin ni venkos per fortika,
Per senlaca energi'.
Malgraŭ ĉiu malhelpanto,
Malgraŭ ĉiu moka kri',
Fine venkos Esperanto,
Se fidelaj restos ni.

4. Do al nia verda stelo,
Fidelecon juras ni,
Ni promesas, ĝis la celo,
Sekvi kien gvidas ĝi.
Al sukceso, batalanto,
Nepre do kondukos ĝi,
Certe venkos Esperanto,
Ĉar fidelaj restos ni!

Ĉiuj kantoj aperintaj en « Belga Esperantisto » estas aparte acetablaj en la Centra Esperantista Belga Oficejo, ĉe O. Van Schoor, 20, Vondelstraat (rue Vondel), Antwerpen (Anvers). Ĉiu ekzemplero kostas 10 centimojn.

Universala Esperanto-Asocio

Ĝia celo. — Ĝia organizo. — Ĝiaj praktikaj servoj. — Ĝia signifo.

Kiam lernanto finis la studadon de Esperanto, venas al li la demando : « Por kio utilas al mi Esperanto ? » Se li ne ricevas tujan precizan respondon, lia fervoro malvarmiĝos ; iom post iom li forlasos nian aferon, ĉar lia scio estos sencela. Saman respondon faras al ni tiaj personoj, kiujn ni instigas al la lernado de Esperanto. Preskaŭ ĉiuj respondas ke Esperanton ili lernos nur tiam, kiam ĝi prezentos por ili difinitan utilecon. Male, se ni povas tuj prezenti al la publiko tute certajn profitojn, kiun havigos al ĝi Esperanto, ĝi pli kaj pli aktive partoprenos en nia afero, ne nur pro entuziasmo al ĝi, sed pro la profito, ĉu, materiala, ĉu idea, kiun ĝi ricevos.

Ĉu ni do povas diri, ke jam nuntempe Esperanto estas utila ? Por respondi per faktoj tiun gravan demandon, t. e. por utiligi Esperanton en la diversaj sferoj de la vivo internacia, fondiĝis vasta kaj tre grava organizajo, nome **Universala Esperanto-Asocio**, en kiu jam partoprenas la pli granda parto de la Esperantistaro.

Ĝia celo

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A., aŭ mal-longe, *Esperantio*) celas la plifaciligon de la ĉiuspecaj materialaj kaj moralaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj, konsekvence, la kreon de fortika ligilo de solidareco inter ili. Ĉar la plej granda baro por la plifaciligado kaj plioftigo de la rilatoj inter diversgentanoj estas la *Diverslingveco*, U. E. A. kiel oficialan lingvon decidis uzi nur la neŭtralan lingvon *Esperanto* tian, kia ĝi rezultas el sia verkaro.

Ĝia organizo

En ĉiu regiono la membroj de U. E. A. (Esperantianoj) balotas *Delegiton*. La Delegito reprezentas la membrojn de sia regiono kaj zorgas pri la funkciado de la diversaj servoj organizataj de U. E. A. Por tio li elektas diversajn helpantojn aŭ *Konsulojn*, speciale konsulon por ĝeneralaj informoj, konsulinon por virinoj, konsulon por komerco kaj industrio, konsulon por junuloj kaj, en marhaveno, konsulon por maraferoj. Tiuj konsuloj havas kiel devon la liveradon de skribaj aŭ parolaj informoj al ĉiuj Esperantianoj pri la temoj, kiuj koncernas fakon. En ĉiuj lokoj de sia regiono, la Delegito elektas *Subdelegitojn*, kiuj plenumas saman rolon kiel li.

La *Komitato* de U. E. A. estas balotata de la Delegitoj. Ĉiu komitatano estas komisiata al difinita Fakoj, pri kiu li zorgas kun la necesaj helpantoj. Ekzistas ĝis nun la jenaj fakoj : Administr-

ado, Financoj, Konsuloj, Esperanto-Oficejoj, Komercio kaj Industrio, Junuloj, Turismo.

Ni aldonu, ke dank'al la iniciatraĵo, ĉiu Delegito povas fari precizajn proponojn kiuj devas esti submetataj al ĝenerala voĉdonado. La organizo de U. E. A. estas do tiel simpla kiel libera; ĝi povos ĉiam facile plivastigi sian agadkampon, laŭ la bezonoj kaj cirkonstancoj.

Ĉiu persono, kiu deziras aliĝi, pagu al la Delegito aŭ Subdelegito de sia regiono kotizajon da nur 36 Sd. Intersaŭge li ricevos membrokarton, kiu donos al li la rajton uzi ĉiujn servojn organizatajn de U. E. A. kaj plendi al la Komitato, se tiuj servoj ne estas plenumitaj.

Servoj de U. E. A.

LIVERADO DE INFORMOJ. — Se Esperantiano deziras ricevi informojn pri iu ajn afero, vojaĝo, samera restado, komercio, industrio, lokaj institucioj, se li bezonas *oficon* aŭ oficiston, fremdan instruiston por siaj infanoj, se li deziras *studadi* en fremdlanda lernejo, vojaĝi mare, k. e., se li deziras helpon en iu ajn loko, li tuj sin turnu al la Delegito aŭ Subdelegito de U. E. A. de tiu loko, kiu plej baldaŭ, ĉu mem, ĉu per la kompetentaj konsuloj, sendos al li la necesajn petitajn informojn.

VOJAĜO. — Plej utila estas U. E. A. al la personoj, kiuj deziras fari vojaĝon tra la landoj, kies lingvon ili ne scias. La vojaĝanto bezonos nur kunporti la Oficialan Jarlibron de U. E. A. kaj la gvidfoliaron de U. E. A., kiu enhavas la plej urgajn informojn pri la ĉefaj lokoj (1) (Esperantiaj firmoj kaj hoteloj, listo de la konsuloj, nomaro de la vidindaĵoj k. a.). Por ricevi pliajn informojn, la vojaĝanto sin turnos al la Delegito, kiu laŭokaze lin prezentos al la konsulo de lia fako, al la lokaj Esperantianoj kaj penos ĉiel agrabligi lian haltadon. Fakte, la vojaĝanto ne estos fremda, sed ekster sia propra lando, dank'al la spirito de solidareco, kiu unuigas ĉiujn Esperantianojn.

VIRINOJ. — Oni konas la malfacilaĵojn, kiujn renkontas la sinjorinoj kaj fraŭlinoj, kiuj vojaĝas solaj tra landoj, kies lingvo ne estas sciata de ili. Dank'al U. E. A. tiuj malfacilaĵoj multe plimalgrandiĝas. La membrinoj de U. E. A. nur bezonos skribe antaŭinformi pri la horo de sia alveturo la Deligiton, kiu sendos konsulinon (2) al la stacidomo por akcepti la vojaĝantinon kaj liveri al ŝi la necesajn helpojn kaj konsilojn.

JUNULOJ. — Se studento deziras koni la kondiĉojn de studado en fremdlanda lernejo aŭ universitato, li simple sin turnu al la konsulo por Junuloj de la dirita urbo. Aliparte, multaj junuloj forveturas eksterlanden, ĉu por lerni la enlandan

(1) Ĝisnun ekzistas 40 gvidfolioj; multaj estas en preparado.

(2) Ekzistas 150 konsulinonj.

lingvon, ĉu por konatiĝi kun la industriaj kaj komercaj metodoj, ĉu por trovi oficon, k. a.; al ili la konsulo por Junuloj estos utila; li donos al ili la bezonatajn informojn, prezentos ilin al samaj enlandaj Esperantianoj, klopodos por ilin laŭeble helpi, tiel ke la enloĝiĝinto konservu pri la vizitata regiono kiel eble plej precizan ideon kaj bonan rememoron.

ESPERANTO-OFICEJO. — En ĉiu loko troviĝas *Esperanto-Oficejo*, t. e. magazeno, ĉe kiu estas alcentrigita ĉio, kio koncernas Esperanton en sama urbo. Tie estas acetebraj kaj mendeblaj ĉiaj Esperantaĵoj; tie estas aboneblaj ĉiuj Esperantaj gazetoj; tie estas aliŝataj ĉiuj informoj pri la Esperantista movado; tie ankaŭ la vojaĝanto, per Esperante redaktita gvidfolio, povas ricevi la plej urgajn informojn pri la urbo.

Ekzistas nun 150 Esperanto-Oficejoj.

KOMERCO KAJ INDUSTRIO. — Speciala fako de U. E. A. estas dediĉita al tiu gravega parto de la vivo internacia. Ĉiu firmo, societo, hotelo, korporacio, kontoro, aliĝinta al U. E. A. havas la rajton ricevi la jenajn specialajn servojn:

Reklamo kaj disdonado de reklamiloj. — En ĉiuj gravaj lokoj niaj reprezentantoj promesis disdoni al la Esperantistoj de sia urbo ĉiujn prospektojn, reklamilojn, katalogojn, prezarojn, kiujn ili ricevos, kondiĉe ke ili estu redaktitaj Esperante kaj senditaj de firmo aliĝinta al U. E. A. Oni tuj komprenos kian profiton ricevos de nun, el vidpunkto de reklamo tiuj komercistoj, kiuj redaktigas Esperante siajn reklamilojn, ĉien disdonotajn per U. E. A. ĝis la plej malproksimaj lokoj.

Perado por reklamo kaj dungado. — Tiel same firmestro, komercisto aŭ privatulo, kiu deziras fari reklamon aŭ dungi oficiston, bezonos nur sin turni al niaj Deligitoj, kiuj sen plia pago tradukos nacien la reklamon aŭ peton ricevitan, kaj ĝin presigos en la gazetojn de sia loko.

Liverado de informoj kaj enketoj. — Ĉiu firmo aliĝinta al U. E. A. rajtas peti de ĉiuj Deligitoj komercajn kaj industriajn informojn ne konfidenciajn kaj per ili fari enketon, en la plej bona kaj fidinda maniero.

Juraj informoj. — Dank'al U. E. A. ĉiu firmo povas senpage ricevi informojn pri ĝeneralaj demandoj pri juro nacia aŭ internacia.

Tiuj tre gravaj specialaj servoj estas farataj al ĉiuj firmoj, institucioj, societoj, korporacioj, kiuj aliĝas al U. E. A. kaj pagas kotizajon da nur 5 Sm. La nomoj de tiuj *Esperantiaj entreprenoj* aperas en la Oficiala Jarlibro de U. E. A. kaj per tio estas rekomendataj al la solidareco de niaj membroj.

TURISMO. — En la celo plifaciligi la vojaĝojn, la turisma fako de U. E. A. organizas, speciale por la Esperantaj kongresoj, *karavanojn*, dank'al kiuj ĝiaj membroj povas vojaĝi en multe pli favoraj kondiĉoj. Plie, sub la aŭspicioj de U. E. A. organiziĝas en pentrindaj regionoj *libertempaj kolonioj*, kie

Esperantianoj amike pasigas sian **libertempon**. U. E. A., kun la helpo de la lokaj grupoj Esperantistaj, zorgas pri la eldonado de *guidfolioj* pri ĉiuj lokoj kaj instigas al la eldonado de allogaj Esperantaj *guidlibroj*, kiuj, disdonataj per nia speciala servo, tre multe helpas por konigi en kiel eble plej vasta maniero la vidindaĵojn de sama regiono.

Por stimuli la agemecon de siaj membroj kaj instigi la plej bonajn iniciatojn, U. E. A. ĉiujare organizas per siaj membroj multajn plej diversajn konkursojn kun monpremioj.

Oni facile povas plimulti la ekzemplojn pri la utileco de U. E. A. La leganto senpene ilin trovos laŭ la supre diritaj. Sed ĉefe rimarkinda estas la fakto, ke tiuj servoj estas eblaj tuj de nun, dank'al la disvastiĝo de Esperanto kaj la forta organizo de la homoj ĝin uzantaj.

Kvankam fondita antaŭ ne longe, U.E. A. jam estas disvastigata sur la tuta mondo. Je la 1a Februaro ĝi havis Delegitojn kaj Subdelegitojn en pli ol 810 lokoj dissemataj en 43 landoj kaj 5,500 membrojn. Multenombraj estas jam la personoj, kiuj uzis kaj uzadas ĝiajn servojn por siaj aferoj; ĉiutage ĝi pligrandigas kaj oni povas antaŭvidi ke post malmulte da tempo, la tuta tergloblo estos kovrata, kvazaŭ per reto, de ĝiaj Delegitoj kaj Subdelegitoj. *Neniu Esperantisto konscia jam devas resti ekster ĝi.*

Socia signifo de U. E. A.

« Esperantismo celas al tio, ke inter la popoloj kreiĝu neŭtrala fundamento, sur kiu la diversaj homaj gentoj povos pace kaj frate interkomunikigadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn. » (D-ro Zamenhof). U. E. A. liveras tiun *neŭtralan* fundamenton, sur kiu ĉiuj homoj, kiuj iel ajn partoprenas en la vivo internacia, ĉu por ideoj, ĉu por materialaj celoj, povos facile interrilatadi. Per la kreo de servoj internaciaj plej diversaj, U. E. A. plifortikigos kaj plirealigos la solidarecon inter diversgentanoj kaj ĝin konsistigos en la reciproka sinbezonado kaj sinhelpado. Tia estas la interna ideo de Esperantismo, tiel ofte aludita de la kreinto de Esperanto; al la konkretigo de tiu fruktorica ideo laboradas U.E. A. Ĝi tiel havas ne nur gravan *praktikan* karakteron, kiun ĝis nun posedis neniu alia internacia institucio, sed plie nedubeblan *homaran* signifon, kiu kun la kresko de ĝia potenco pli kaj pli forte sin trudos al la atento de l'mondo.

Alta Konsilantaro de U. E. A.

D-ro L.-L. ZAMENHOF, aŭtoro de Esperanto, Honora Prezidanto de U. E. A.;

E. BOIRAC, prezidanto de la Esp.-Akademio;

D-ro MYBS, prezidanto de la Germana Esp. Asocio;

K-lo POLLEN, prezidanto de la Brita Esp.-Asocio;
G-lo SEBERT, prezidanto de la Kongresa Komitato.

Komitato de U. E. A.

H. BOLINGBROKE-MUDIE, Prezidanto de U. E. A. ;
H. HODLER (Administrado), Vicprezidanto de U. E. A. ;
TH. ROUSSEAU (Financoj);
A. CARLES (Konsuloj);
P. BLAISE (Esp.-Oficejoj);
J. SCHMID (Turismo);
D-ro KANDT (Komerco kaj Industrio);
F. ROCKMANN (Junuloj).

ALVOKO


La esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la organizado de U. E. A. en Antverpeno kaj ĉirkaŭaĵoj, estas petataj kunveni je **Mardo, la 10an de Majo** en la **Hotelo Stein**, Alvenejo de Keyser, 74, Antverpeno.

Tra la mezo de Francujo

(El: « Mia vojaĝo al Barcelono »).

...Je la duono post la dua, la mardon (31an de Aŭgusto 1909), ni alvenis en *Limoges* kie ni promenis ĝis la antikva ĉefpreĝejo kaj la Urbdomo. Ni ree envagonariĝis post du horoj, kaj tuj poste ni havis belan vidaĵon de la tuta urbo, de la rivero *Vienne* kaj ĝiaj multaj pontoj.

La tuta regiono, kiun ni tiam traveturis, estas tre monta, tre pentrinda. Multegaj tuneloj intersekvas.




Uzerche. — La Kasteloj.

Je la sesa proksimume ni alvenis en *Uzerche*. Poŝtveturilo kondukis nin de la stacidomo al la urbeto. Kiom ĉarma estas Uzerche! Ĝi elstaras sur monteto, kiun ĉirkaŭas laŭ kapricaj kurbigoj la rivero *Vézère*. La tuta urbeto estas antikva. Multaj grandegaj domoj fiere aperas sur la supro kiel kasteloj; la stratetoj estas tre mallarĝaj, vere mezepokaj, kaj multaj dometoj ŝajnas vere falontaj. Ankaŭ nia hotelo estas tre antikva, tre kampa; ĝi aspektas kiel svisa kampodomo, kun ligna balkono kaj per verdaĵo kovrita fasado. En la plej malriĉaj dometoj de *Uzerche* brilas vespere elektraj lampetoj, kaj ankaŭ la vojoj en la kamparo estas bele elektre lumigitaj. Ni vizitis tiun ĉarman urbeton je l'antaŭvespero, kaj dum la proksima mateno. Kun vera bedaŭro ni forlasis ĝin je la deknua.

Denove montan regionon ni traveturis, kaj multajn longegajn tunelojn. En *Brive* ni malsupreniris pro ŝanĝo de vagonaro. Post *Brive* ni trapasis tunelon de 2260 metroj.

Rocamadour!

Ni tie alvenis ĉe la stacidomo post la dua. Tri kvaronojn da horo plie ni iris poŝtveturile ĝis la urbeto. Kian belan vojon ni laŭiris, unue suprenveturante ĝis la vilaĝeto l'Hospitalet, kaj poste malsupren sur la kruta vojrandoj, flanke de profundegajo, ĝis la piedo de la ŝtonego sur kiu staras *Rocamadour*. La granda vilaĝa strato kuŝas malsupre, sed supre sur la monto, aŭ plivole sur kruta ŝtonego kies supraĵo tute antaŭklinas sur la valon, tie elstaras, en nobla fiereco, la kastelo kaj preĝejo




Rocamadour.

de sankta Amadour. Tie, laŭ la legendo, vivis en la unua jarcento la ermito Zachée aŭ St Amadour (*Roc-amadour* signifas rokamanto). Tiu loko estas unu el la plej malnovaj francaj

pilgrimejoj. Vespere, en la mallumeco, la pilgrimantoj supreniras aŭ suprenrampas la monton kun torĉoj. Tiu vidaĵo, oni diras, estas impresa. La preĝejo, kies unu flanko estas la nuda ŝtonego, estas bela kaj stranga. La kastelo servas nun kiel pastrejo. Ĉe la kontraŭa flanko de la valo, sur aliaj krutaj rokoj, oni bone povas admiri la tutan imponantan kaj terurigantan *Rocamadour*.

Ni ĝin forlasis je la oka vespere por noktloĝi en *Villefranche de Rouergue*, kie ni forveturis la jaŭdon matene frue, por viziti *Cordes*. Jam de la stacidomo de *Vindrac*, kie ni elvagonarigis, ni ekvidis la izolatan monteton sur kiu starigas *Cordes*. Unu horon daŭras ankoraŭ la omnibusa veturado ĝis la urbeto. Tre malnova estas *Cordes*, kun siaj antikvaj pordoj kaj remparoj. En la ĉefa, mallarĝa strato, oni vidas, kiel memorajojn el gloriplenaj tempoj, la domon de la granda Ĉasestro (*grand veneur*), de la granda Falkĉasestro (*grand fauconnier*) — la nunan *Urbdomon* — kaj de la granda Ĉevalestro (*grand écuyer*).




Albi. — La katedralo.

Je la unua ni ree forveturis el *Vindrac*; post ŝanĝo de vagonaro en *Tessonnières*, ni estis je la dua kaj duono en *Albi*, kie ni precipe venis por viziti ĝian fame konatan, strangan katedralon. Ĝi estas konstruita per ruĝaj brikoj kaj havas ekstere la aspekton de fortikaĵo. Interne ĝi estas belega, kaj enhavas grandvalorajn artaĵojn.

Post vagonarveturado de du horoj, ni alvenis, je la duono post la oka, en *Toulouse*, kiun ni vizitis la sekvantan tagon.

Toulouse estas granda urbo, sur la bordoj de la *Garonne*. Ĝi havas tre belan *Urbdomon* (*le Capitole*), kiu kovras unu flankon de la vastega *Place du Capitole*. Ĝi ankaŭ posedas kelkajn rimarkindajn preĝejojn, kaj belajn publikajn ĝardenojn. La Muzeo estas rekonstruita monaĥejo, kun nova parto aldonita. La interna malnova korto estas vidinda.

Je la natia vespere ni ankoraŭ forveturis el Toulouse por alveni en *Carcassonne* je la duono post la deka.



Carcassonne. — La remparoj.

Matene, la sabaton 4an, ni vizitis tiun interesegan urbon. Ĝi konsistas el du tre malsimilaj partoj: la malalta urbo, sur la maldekstra bordo de la rivero Aude, kaj la « Cité », sur monteto je la alia bordo.

Tiu « Cité » (civito aŭ praurbo) estas vera kuriozaĵo. Ĝi estas antikva urbo, tute konservita kaj restarigita kiel ĝi ekzistis en la Mezepoko, kun siaj duoblaj remparoj kaj multegaj rondaj turoj, sia kastelo kaj sia preĝejo. La plej malnova parto datumas de la Va jarcento. Nur du pordoj ebligas la eniron en tiun mirinde fortikigitan urbeton, kies antikvaj dometoj estas ankoraŭ enloĝataj, en kies mallargaj stratetoj ludas nuntempaj infanoj, kaj virinoj staras sur la sojloj. De la supro de la remparoj oni havas belegan vidaĵon ĝis la montoj Pireneoj.

Ni forlasis Carcassonne kaj ĝiajn vidindaĵojn je la dekunua, por fine alveturi al Barcelono, al la kongreso, al la granda celo de nia vojaĝo!

MARIA POSENAER.

Internacia ekspozicio de Bruselo

La raporto de la loka esperantista komitato alvenis al mia redakcio tro malfrue por enpresigi ĝin en la nunan numeron.

Jen tamen la ĉefaj sciigoj:

— Ciu esperantisto estas petata sin prezenti al la rendevuo, Nederlanda sekcio, kaj tie sin turni al S-ro Bles, kiu tre kompleze donos al ili ĉiujn informojn pri Esperanto en la ekspozicio kaj pri la esperantista movado en la urbo.

— En Bruselo mem tiu rendevuo estas la hotelo *Moulin d'Or*, 30, rue d'Assaut, tutproksime de la esperanto-oficejo, 3, rue du Bois Sauvage.

— La fremdlandaj esperantistoj bonvolu sciigi pri la horo kaj la stacidomo de sia alveno S-ro A. RICHARDSON, *Institut St Louis, rue du Marais, Bruxelles*. Se eble ili estos akceptataj en la stacidomo; ili estas petataj ĉiam porti la verdan stelon, kaj paroli kiel eble plej ofte Esperanton.

— Oni multnombre ĉeestu la paroladon de S-ro CARLO BOURLET (San de Majo), kaj tiun de S-ro H. HODLER (12an de Majo); tiuj ĉi paroladoj okazos en la ekspozicio mem, je la 4a, tre precize.

Pri la Unua Internacia Kongreso de la Katolikaj Esperantistoj

(Parizo. 30 Marto-3 Aprilo 1910)

En tiu ĉi artikolo mi pritraktos tiun kongreson nur sub vidpunkto esperanta kaj esperantinovada, kaj montros, ke ĝi estas ne nur grava sukceso, sed tute neatendita elmonro de l'Esperanta taŭgeco por plej diversaj altsciencaj demandoj.

Decidita dum la Barcelona, la Pariza kongreso efektive nur komencis esti organizata antaŭ tri monatoj; por tiu, kiu scias ion pri kongresorganizo, la fiasko ŝajnis neevitebla, des pli, ĉar oni devis en sama jaro, postuli de l'kongresanoj, duan grandegan vojaĝon. Ja, por esperi sukceson en tiaj kondiĉoj, oni bezonas la fidon kaj kuragecon de niaj Parizaj amikoj: Gebaronoj de Menil, Pastro Duvaux, Sinjoro Colas, kaj la aliaj membroj de l'organiza komitato. Ili fidis, ili laboris senhalte, venkis ĉiujn malhelpojn, kaj la sukceso estis plena, mirinda. Proksimume kvarcent membroj, inter kiuj cent da nefrancaj, kunvenis en Parizo, reprezentante 17 naciojn; la aprobo de Lia Ĉefepiskopa Moŝto Mgr. Amette de Parizo; la solena malfermo kiun faris Monsinjoro Baudrillard, rektoro de l'Katolika Universitato; la ĉeesto de Lia Episkopa Moŝto Mgr. Foucault de Saint-Dié; la Apostola Beno kaj la plena Indulgo kiujn sendis Lia Papa Moŝto Pio X; la partopreno de kvindeko almenaŭ da pastroj; ĉio ĉi donis al la kongreso vere katolike oficialan karakteron.

La kongreso estis prezidata de nia klera amiko, S-ro Pastro Richardson, vic-prezidanto de la Belga Ligo Esperantista.

La kunsidejo en la Katolika Instituto (Universitato), la celmontranta parolado de l'altsciencia profesoro Gautherot, la temoj pridiskutotaj, kaj la multnombraj paroladoj plej valoraj sub sciencaj kaj religiaj vidpunktoj, alportis al la kongreso la markon de alta scienco. Jen, pri la sukceso. Nun pri la taŭgeco de Esperanto:

Oni ne bezonis esti pesimisto por antaŭvidi jenan rezultaton: Oni legos dum la kongreso temojn plej-zorge pristuditajn lingve kaj enhave; oni zorge evitos la diskutadon, kiam anstataŭos aplaŭda: *tute bone! tute bone!* Aŭ, pro la partopreno de multaj Francoj, la diskutado, balbute komencante en Esperanto, baldaŭ france daŭriĝos.

Granda eraro! Krom la francaj paroladoj de Mgr. Baudrillard, de Profesoro Gautherot kaj de Baronino de Ménil, paroladoj kiuj celis la propagandon de l'neesperantistoj dum du porpropagandaj kunsidoj, ĉio okazis en Esperanto. Estis ja multe da zorge pristuditaj temoj, sed estis ankaŭ, dum la tute ne evitataj diskutoj, tute ne preparitaj paroladoj tutfluaj kaj tre rimarkindaj. Tio okazis precipe, kiam oni pridiskutis la belan raporton de Sinjoro Van Schoor pri la latina elparolado kaj kiam oni pridiskutis la regularon de la Internacia Ligo por dediĉi Esperanton al la servo de l'Eklezio. Tiam oni aŭdis parolantojn el Holando, Francujo, Hispanujo, Aŭstrujo, Anglujo, Italujo, Rusujo, Belgujo, k. c., kaj neeble estis distingi la naciecon de la parolantoj; neeble estis, en tiuj varmegaj opiniesprimoj, trovi ion fremdlingvecan; estis vere kvazaŭ samlingvanoj, tre lertaj interdiskutantaj.

Saman impreson oni sentis dum la interparoladoj en restoracioj, en tramveturiloj, en ekskursoj, k. t. p.

Rimarkinda okazintaĵo: oni tute ne sukcesis kanti kune en latina lingvo, nek *Veni Creator*, nek *Tantum ergo*, sed oni tre facile, kvazaŭ unuvoĉe, kantis la esperantajn kantikojn.

Mi povas konklude rediri, ke la katolika kongreso estis neantaŭvidita elmontro de la taŭgeco de Esperanto por kongresoj internaciaj, kaj por pritraktado de ĉiuspecaj tutmondaj aferoj.

La unua katolika kongreso pruvis al la Esperantistaro ke, se la ĝeneralaj esperantistaj kongresoj estas tre utilaj por konservi kaj kreskigi la fervoron kaj entuziasmon en nia agado, la fakaj kongresoj montras la valoron, la fortecon, la vivecon de la lingvo internacia, ĝian vere praktikan utilecon.

Pro tiu pruvo ni gratulas kaj dankas la kuraĝplonajn organizintojn de tiu kongreso; ni ankaŭ dankas niajn Parizajn fratojn pro la afabla gastameco kiun ni ĉe ili ĝuadis; kaj nun, kun nova espero kaj nova fervoro, ni iru antaŭen al nia celo: la triumfo de Esperanto per uzado praktika.

BELGA ĈEESTINTO.

ESPERANTO FACILA

LA KELMIKROBOJ VENOS AL BRUĜO!

Antaŭ: unu monato Sinjoro Luptrager, la respektinda profesoro de la Iksurba grupo, vizitis min.

— S-ro Skaldo, li diris je la fino de nia interparolado, antaŭ ol forlasi vin, mi devas ankoraŭ esprimi al vi la plej koran dankon de miaj ĝelernantoj pro via artikolo « Pri Deziroj ».

— Ĉu mi sukcesis plaĉi ilin?

— Treege! Tamen vi forĝesis priparoli unu tre gravan deziron.

— Mi miras, kiun...

— Tiun ĉi: *Mi deziras starigi misteran societon en nia grupo mem.*

— Efektive? Mi bedaŭras, ke manko de loko...

— La forĝesitaĵo estas des pli bedaŭrinda, ke tiu ŝajne stranga deziro jam nun plenumiĝis. Ĉu vi nenion sciigis pri niaj misteraj kaj famaj kelmikroboj?

— Kion vi diris! mikroboj de kelo?

— Jes, S-ro Skaldo, kaj de kelkaj semajnoj la kelmikroboj estas vere la terurigo de nia grupo. Neniu konas ilin, sed ili konas ĉiun. Ili sendas al ni misterajn sciigojn, ili okupas sin pri la mastrumo (1) de nia grupo, ili disponas kaj decidas pri nia sorto.

— Kiel la itala « nigra mano »?

— Feliĉe, plej ofte, bonfaranta mano. Ekzemple, okaze de ŝia edziniĝo, ili ĉarme donacis (2) belan esperantistinon per belega bukedo. Sed la sekvonta fakto pli klare montras ilian efikan, misteran agon. Nia grupestraro estis reelektota. Du partioj kontraŭstaris, ni diru, juna kaj maljuna. Antaŭ la elekto alvenis al ni ĉiuj informo sciiganta nin: Elektu tiel kiel, tiun kiun, tiom kiom vi volas, la kelmikroboj certigas ke la sekvontaj kandidatoj estos elektataj; nome:

S-ro A. M. (maljuna partio) kiel prezidanto,

S-ro B. S. (juna partio) kiel sekretario, k. t. p.

— Kaj la rezultato de la elekto?

— Pravigis entute la informon de la kelmikroboj.

— Tamen tiuj ĉi devas nepre (3) esti konataj personoj, ili devas havi lokon, kie ili regule aŭ neregule kunvenas?

— Sendube. Sed celante agi mistere, ili kaŝas sin perfekte kaj ne nomas sian kunvenejon. Nur post longa serĉado, ni scias: ke la Kelmikroboj kunvenas en kelo sub iu trinkejo, al kies estro ili neniel pagas luprezon, (4) sed promesis trinki ĉiufoje almenaŭ unu verŝilon (5) da biero; — ke tiu trinkejo staras en iu strato, kie tramveturiloj rulas; — ke ĉiuj mikroboj akceptis kaj obeas fiksan regularon; — ke ilin povas viziti nur fremdurbanoj, kiuj submetas sin je difinitaj kondiĉoj. Unu

el tiuj kondiĉoj estas : alveturi al kaj reveni de Mikrobooj kun kovritaj okuloj.

— Kia stranga mistereco !

— Al vi mi povas diri, ke oni bezonas sciigi min pri iu proponata vizito.

— Ho ! mi komprenas : vi mem estas unu el la famaj Kelmikroboj !

— Vi eraras. Mi eĉ neniam vidis la misteran kelon, sed mi, kaj mi sole, scias al kies zorgoj mi povas sendi vizitontajn fremdurbanojn. Kaj se vi, ekzemple...

Jam la sekvontan sabbatvesperon, je la naŭa, mi alvenis en la stacidomo de Iksurbo.

Mia scivolo (6) estis grandega ! Mi do tuj eliris el la stacidomo, kaj, laŭ interkonsento, mi direktis miajn paŝojn maldekstren, al la tria stratlanterno, kie mi atendis, tenante du fingrojn de la dekstra mano sub sub mia verda bruststeleto.

Baldaŭ luveturilo sen numero haltis antaŭ mi kaj el ĝi saltis junulo, vestita per studenta ĉapo, kiu ĝentile demandis :

— Ĉu mi havas la honoron paroli kun S-ro Skaldo, kiu deziras viziti la Kelmikrobojn ?

— Jes, Sinjoro.

— Ĉu vi interkonsentas pri ĉiuj kondiĉoj ?

— Mi konas kaj mi respektos ilin.

— Bone ! — Veturigisto, vi konas la vojon, antaŭen !

Tirante min en la internon de la veturilo, li kovris preskaŭ mian tutan vizaĝon per longa dika, nigra tuko, tiel ke mi neniel povis vidi.

Tiamaniere mi faris misteran vojaĝon dum kelkaj minutoj, kiuj laŭ mi similis je eterneco. Mi nur aŭdis la bruon de veturiloj ; de iu kriisto antaŭ kinematografejo, de preĝejaj (7) sonoriloj...

Fine, nia veturilo haltis, ni leviĝis, kaj mia kunvojaĝanto gvidis min, dirante : « Nun atentu, S-ro, eliru..., supreniru..., marŝu antaŭen..., malsupreniru..., ankoraŭ..., nun sidiĝu. »

Mi agis laŭ tiuj konsiloj ; poste mi aŭdis profundan voĉon :

« Bonvenon al vi, vojaĝanto ! Kaj nun faru agon, kiun malfeliĉe multe da homoj neniam faros : malkovru viajn okulojn ! ne estu plu blinda ! »

Mi forprenis la dikan tukon de miaj okuloj kaj ekrigardis scieeme, tre mirante (8).

Mi estis en granda kelo kun malalta plafono, ĉe kiu kelkaj verdaj Veneziaj lanternoj pendis, kiuj jetis sur la scenon strangan palan lumon. Antaŭ mi staris longa, per verda tuko kovrita tablo, malantaŭ kiu sidis senmove kaj silente dudeko da personoj verde maskitaj, kaj vestitaj per longaj, larĝaj

verdaj domino'oj ; du tiaj personoj staris flanke de mi. Mi ne vidis mian gvidinton.

La muroj kaj plafono de la kelo estis kovritaj per nigra papero (brrr !...) en kiu, super ni tamen brilis multaj verdaj steloj : tio estis do vere alegorio de Esperanto en la mondo.

Post la unua momento de mia mirado, mi klinis la kapon kaj diris kuraĝe :

« Bonan vesperon al vi, samideanoj ! Nu, ĉu vi estas la famaj Kelmikroboj ? »

Sed nur la sama profunda voĉo eliganta inter verda masko kaj plena nigra barbo, vera aŭ falsa, la voĉo de la Kelmikrobestro, — sendube, ĉar li sidis en la mezo de la maskitoj — respondis :

Sinjoro Skaldo, la Kelmikroboj nur povas parolis kiam vi estas regule akceptita. Gardistoj, faru vian devon ! »

Mia miro pligrandiĝis, kiam miaj du najbaroj senĝene fortiris miajn botetojn kaj ŝtrumpetojn, alportis kuvon (7) da akvo, kaj kvazaŭ laŭ tre malnova, respektinda, patriarka kutimo, lavis miajn piedojn per sponĝoj !.. Poste ili sekigis miajn piedojn kaj revestigis ilin.

Tiam la Kelmikrobestro prenis verdan verŝilon, starantan sur la tablo, kaj verŝis ŝaumantan bieron en grandan belan kornon, kiun li prezentis al mi, dirante :

« Nun, S-ro Skaldo, trinku kun ni la trinkon je samideaneco ! »

Mi trinkis kaj pasigis la kornon al la aliaj, kiuj faris ankaŭ tiele, dum ili hore, tenore kaj base, kantis kaj rekantis :

« Li vivu, li vivu, nia Zamenhof ! »

De nun, mi sentis min tute hejme. Mi eĉ komprenis ke Esperantistoj, pro sia internacia naturo, rajtas (10) alpreni ĉiun ajn internacian kutimon novan aŭ malnovan.

Ree mi aŭdis la seriozan voĉon de la estro :

« S-ro Skaldo, regulare vi devas nun respondi tri demandojn. Do unue : Kial la Kelmikroboj laboras mistere ? »

Post duminuta pripenso, mi respondis :

Tiel kiel nekonataj malamikoj povas fari la plej grandan malbonon, inteligentaj, nekonataj amikoj povas utilegi al Esperanto per trankvila, lerta laboro. Plie, mi vidas ke, per sia originaleco, la Kelmikroboj ne forgesas kunigi agrablon kaj utilon.

— Kiu propagando por Esperanto estas pli efika, tiu inter viroj, aŭ tiu inter virinoj ?

— La lasta, sendube. Ĉar virino estas pli tuŝebla spirite kaj kore per fajra parolado ol viro ; ŝi okupas sin pli serioze pri nova afero ol la jam tre okupata viro ; ŝi influas sur sian socian mezou kaj sur la estonton.

— Ĉu Esperanto havas lingvan aŭ religian karakteron ?

— Ambaŭ. Ĝi estas lingvo, kiu, pro sia mirinda simpla kunmeto naskas fidon kaj religian entuziasmon ĉe siaj anoj,

kiuj, dank'al tiuj ecoj, propagandas ĝin kaj eĉ morale batalas por ĝi. Ĝi ne havos plu religian karakteron, kiam ĝi praktike regos la internaciajn rilatojn en la tuta mondo.

Aplaŭdoj salutis mian lastan respondon. Post mistera voĉdono, mi aŭdis solenan deklaron de la sekretario, nomata S-ro Bacilvirgulo :

« S-ro Skaldo, de nun vi estas honora membro de nia fama klubo, kiu baldaŭ havos membrojn kaj korespondantojn en ĉiu granda urbo de la tero. Ke via laboro prosperu, por la bono de Esperanto! Je via sano, S-ro Skaldmikrobo! »

